

Rovapn saluon!




ANTAUEN

ENHAVO

julio - 2000 - Nº 24-a
ASTURIO


- 2....Nia Regiono
- 3....Kanto al la Virino
- 4-5..Adiaŭ mia Bona Amiko
- 6....Dizelo
- 7....Perditaj Kutimoj (2^a)
- 8....La Paŝtisto kaj la "Xana"
- 9....Mesagoj
- 10..La Aĝo de la Senkulpeco
- 11..La Ran-virino Quork-quork kaj sia familio
- 12-13..Eldorado
- 14..Pri Katoj kaj Kuniklo
- 15..Amuzajoj
- 16..Astura Kanto



REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO

NIA REGIONO

(ASTURIAS)



Preĝejo SANTUJANO

Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: **Nicolás Muñiz**

Prezidanto: **Cezaro García**

Sekretariino: **M^a Luisa Menéndez**

Direktoreco kaj Desegno

revuo Antaŭen: **Císimo Rabanedo**

Kasisto: **Luis González**

Bibliotekistino: **M^a Isabel Murillo**

Gekomitatanoj:

M^a José Alvarez Faedo

David Menéndez

Eva Gonzalez

Gene Alvarez

Lisa Ejarque

Daise Murillo

Nia adreso

Casa Municipal de Cultura

33400 AVILÉS

Asturias

Tfn 98 554 11 27

Subvenciita per la Registaro

de la Avilesa Municipo

Deposito legal:

Nº AS 1398 (9)

La arkivejo de la katedralo estis iam ŝtata pro sia eksterordinara graveco. Hodiaŭ, grava ankoraŭ, gardas verkojn kiel la nomata Gotika Libro aŭ Libro de la Testamentoj. Ĝi estas libro kiun la episkopo Pelajo ordonis fari inter la jaroj 1126 kaj 1129 kaj kiu, krom kopii la plej elstaran diplomistikon de la astura regno, substrekas klare tutan antologian kurson pri romanika pentrarto.

Je la malalta parto de la urbo estas la preĝejo Santujano, la plej ambicia konstruaĵo de Alfonso la Dua. Li ordonis ties faradon inter la jaroj 812 kaj 842. Ĝi estas ekvilibra, majesta, montranta preskaŭ "klasikan" horizontalecon. Ĝi posedas tre originalan karakteron formulita de la fratigado de visigotaj kaj romanaj konstrutradicioj. Estas en ĝi kvazaŭ la malfrua eĥo de la Malalta Antikveco.

La Redakcio

KANTO AL LA VIRINO (fragmento)

Sur la dolor' de la vivo
estas flora via rideto
Kvazaŭ de dioj konsol'
sur la laciĝita fronto
la iris' de via rigardo
estas stelo de la ĉiel'.

Por la lipo ridetanta
via amo sian songon
malligu
en la flor de madrigalo;
kaj estas rukul' de kolombo
rozo de lum' kaj d'aromo
de unu sorĉista rozujo

Sur la vivo vi estas floro;
en la amareco, konsol';
en la ploro vi estas amo
kaj en la amo vi estas ĉiel'.
Kaj en la dolora avido
de idealo kaj feliĉo
vi al ni oferas, malavara,
de iu espero la kalikon



Verkis *Luis Menéndez LUMEN*
Esperantigis *M^a Luisa Menéndez*

Adiaŭ, mia kara amiko!





✿ Mi dediĉas tiun-ĉi paĝon al la memoro d'amiko, de bona homo, d'unu el tiuj decaj, respektaj, korinklinaj kaj afablaj personoj, kun kiuj - hazarde - oni komencas amikecon foje, kaj kies amikeco kreskas kaj daŭrigas kun la paso de la jaroj... Mi dediĉas tiun-ĉi paĝon al Nicolas Muñiz.


✿ Pro ĉirkonstancoj de la vivo, bedaŭrinde mi ne povis sendi al li mian adiaŭon en la lasta numero de nia revuo, tial mi esperas ke vi komprenos mian bezonon pri oferti al li nun mian lastan omaĝon.

✿ Mi ne laŭdos tie-ĉi lian multe-laŭdindan profesian kaj literaturan verkon, ĉar tio jam estis farita de aliaj per belegaj kaj tutkoraj vortoj. Kiel mi diris kiam mi komencis, mi dediĉas tiun-ĉi paĝon al la memoro d'amiko, d'amiko kiu ĉiam estis fidela al liaj idealoj, al liaj kaŭzoj, kaj kiun ni, geesperantistoj, rememoros - inter aliaj multaj kialoj - pro lasi nin je la tago kiam oni festis la datrevenon de la Doktoro Zamenhof, la kreanto de la internacia lingvo Esperanto, la kaŭzon kiun mia amiko estis defendante dum deksep jaroj.

✿ Mi ankoraŭ rememorigas la unan fojon kiam mi vidis lin, aŭ, pli bone, kiam mi vidis ilin: antaŭ deksep jaroj mi eniris klasejon de la antaŭa Lernejo de Antoj kaj Metioj de Avilés por ricevi kurson de Esperanto kaj, inter aliaj personoj, tie, sidante en pupitro, estis Ludovikino kaj Niko. Vere estas ke ni ne povas paroli pri unu sen mencii la alian, ĉar, se John Donne - Angla Renesanca poeto - diris ke por montri al sia amatino lian amon, anstataŭ interdaŭgi ilian koron ili devus fandi iliajn du koron en unu, Ludovikino kaj Niko reprezentus la idealon de la Renesanca poeto, ĉar li ĉiam estis kunkune kaj en harmonio.

 Kaj mi povas tion atesti, ĉar, komencintaj kiel "gubernantoj", ni baldaŭ estis unuiĝitaj per granda amikeco - mi komencis viziti ilin por praktiki Esperanton, poste, kune kun aliaj kunuloj, ni estis fondantaj membroj de la Avilesa Esperanta Asocio *ATAVEN*, kaj de la revuo same nomata -, kaj je tiuj deksep jaroj, mi neniam aŭdis ilin interŝanĝi vortojn kiuj ne estis afekciaj.

 Se oni povis kulpiĝi Nikolás pro io, tio estis pro la peko kiun la homaro trenas ekde la komenco de la tempoj: tiu sopirego pro kono kiu unue venkis Adamon kaj Evon laŭ la Genezo, kiu poste impulsis Faŭston vendi lian animon al la diablo - en la verko de Christopher Marlowe je la fino de la XVII-a jarcento -, kaj ankaŭ igis la homon denove fali en la eposa reskribado de la Genezo laŭ John Milton en la *Paradizo Perdita* - XVIII-a jarcento -, tio kion poste ankoraŭ aliaj multaj aŭtoroj reprenus.


 Nicolás estis interesita pri ĉio: pri la lingvoj, pri la novaj teknologioj, pri la muziko, pri la literaturo, pri vojaĝi kaj koni novajn kulturojn sed ne kun tiu malsana sopirego pri kono kiu karakterizis Faŭston, sed kun tiu sana sciivolo kiu karakterizas la homojn konsciajn kaj inteligentajn, kiuj (ĉi-foje uzante parabolon de la Biblio) volas profiti la talantojn kiujn la Sinjoro donis al ili. Kaj nun mi jam scias ke mi povas adiaŭi mian amikon trankvile, ĉar la Sinjoro (denove laŭ la parabolo) premias tiujn kiuj scias kiel pli profiti iliajn talantojn: konsolas min scii ke, laŭ tio, mia amiko, tie en la Ĉielo, eble ricevos la plej bonan premion. Li ege meritas ĝin.

Maria José Álvarez Faedo



DIZELO

La tuta mondo aŭdis paroli, almenaŭ, pri la dizelaj motoroj, la dizelaj veturiloj, ktp. Tamen malmultaj scias ke la vorto "dizelo" ŝuldas sian nomon al Rudolf Diesel, kiu naskiĝis en Parizo el germanaj gepatroj la 18-an de marto de 1858. En 1870, post la batalo de Sedano, la familio Diesel instaligis en Germanio kaj la malgranda Rudolf, 12-jara, enskribigis en la Industria Liceo de Augsburgo, kie li finis sian studadon 10 jarojn poste. Li interesiĝis pri la refreŝigado-inĝenierarto, kaj li substituis la vaporon de akvo al hejtita amoniako kies premon oni kies la kvarobligis. En 1893 la inĝenieroj de MAN (Maschinen Augsburg Nürnberg) inspiriĝis de la ideoj de Diesel kaj konstruis la unuan motoron kiu povas nomiĝi tiel, kaj kiun sekvis aliaj motoroj ĉiufoje pli perfektigitaj. La inventisto konstatis ke la ceteraj riĉiĝis pro sia agado kaj li decidis proprariske ekkonstrui motorojn por aŭtomobiloj kaj lokomotivoj. Li malsukcesis, kaj li tiel konfuziĝis ke la 20-an de septembro de 1913, dum marveturo de Antverpeno al Anglio, li malaperis de la ŝipo, laŭsupoze memmortiĝonta.



DASE

PERDITAJ KUTIMOJ (2^a)

Alifoje ŝi parolis pri la malgranda bazaro de Karbajeo, kie la brutvendistoj vestis sin per longaj kiteloj kaj bluaj pantalonoj, aŭ pri "La Chokolatera", nomo per kiu oni konis la lokomotivon de la trajno kiu trafis la strandon, kie nur la malplej aĝaj kuraĝis bani sin vestitaj per dikaj bankalsonoj kiuj, ŝprucante akvon, iĝis tre pezaj kaj kaŭzis multe da malvarmo. Ŝi ne forgesis la glaciajn vesperojn kiam, jam nokte, ili foriris por peti la kristnaskdonacon kaj ili kantis kristnaskkantojn ŝanĝe de dolĉaĵoj kaj keksoj. Ni miris eksciante ke je tiu tempo preskaŭ neniu havis kristnaskajn ornaĵojn en la domoj kaj ke tial la plej riĉaj permesis la geinfanojn eniri iliajn salonojn por ke ĉi tiuj povu ilin rigardi. Li ankaŭ ne preterlasis la oftajn inundojn pro la riveroj kiuj nun iradas sub la urbo, tiuj kiuj atingis ke la vivado iĝu frenezeta; tiel okazis kiam la panvendisto liveradis la panon al siak klientoj uzante barkon ŝipirantan tra la akvoplenaj stratoj. Ŝi rememoris la festojn, la avelojn kiujn la knaboj donacis al siaj fianĉinoj por ke ĉi tiuj pardonu iliajn ofendaĵojn... la kantojn, la dancojn kaj la karnavaloj kiam la junuloj maskovestis kun iu ajn tipo de tukoj kaj bestokapoj. Ŝi rakontis pri la vizitoj kiujn faris meznokte la gravedaj virinoj al la kapelo de Galiana por ke ĉio iru bone. Ŝi rememoris la malgaja sonorado de la kamparanoj antaŭsentante morton post ŝtormo, kaj ni sentis kiel nia hararo hirtiĝis auskultinte ŝian rakontadon pri fantomoj aperintaj en la tombejo La Carriona... kaj tiel, meze de vortoj kun odoro je naftalino kie kaŝiĝis fiakroj, virinoj sidantaj en longaj vicoj flikante retojn, legendoj pri *trasgos*¹ kaj *xanes*², tolaĵoj blankiĝantaj je la suno, parolado ĉe la fonto ... pasis la vesperoj kiuj alimaniere, post la lerneja laboro, ŝajnus al ni senfinaj atendente noktomanĝon.

Mi ĵus malŝaltis la Interreton. Inter miloj kaj miloj da vortoj, inter la granda amaso da informado kaj kontaktoj kiujn la komputilo montras, mi domaĝe trovis nenion redonante min al ĉi tiu mondo, nenion permesante min evoki la kriojn de la mevoj en la ŝtormaj noktoj, la malseko de la stratoj, la hararneĝo de mia avino, ne eĉ iun odoron, ion revigante al mi pri la gusto de ŝiaj mirindaj anizkringoj.

Teresa Gutiérrez

¹ Pluralo de *trasgu*, astura koboldo

² Pluralo de *xana*, astura feino (elparolu 'sâna')

LA PAŜTISTO KAJ LA "XANA"

Apud ŝafejo en Ponga oni trovas kavernon kiu estas loĝata de grupo da feinoj. La feinoj eliris nokte lavi la lesivadon al la fonto kaj ili etendis sin sub la radioj de la Luno. Je la tagiĝo la feinoj ŝpinis sur kampeto kiu estas antaŭ la kaverno.

Paŝtisto pasis ĉiutage je tie, ĵen bela knabo!, kiu kantis pli bone ol la turdoj kantantaj en la kverkaro matene.

La paŝtisto atingis la amikecon de la feinoj kaj dum lia brutaro paŝtigis li amuziĝis kun ili kaŝludante inter la rokegoj kaj dancante sur la kampetoj.

Kaj okazis ke la paŝtisto enamiĝis kun la plej bela feino kaj deklaris sian amon al ŝi. La feino diris al li: Se vi volas kunpreni min, via patrino devas konsenti. Poste vi devas fari ĉi tion: kiam miaj kunulinoj kaj mi alproksimiĝos por eniri la kavernon vi prenu min je la subjupo, ĵetu sur min iom da tero el la kampeto ĉirkau la preĝejo kaj mi estos via.

La paŝtisto agis tiel kaj li kunprenis la feinon. Iun tagon, kiam la feino estis erpante, la paŝtisto alvenis de la monto kaj diris al la feino ke, pasinte antaŭ la kaverno, li aŭdis:

- Ha! Feino, fratino!
- Vi ekiris kaj lasis nin solaj!

La feino ĵetis al li la herson kaj malaperis de la domo por ĉiam.



Ludoviko . Februaro, 2000.

MESAĜOJ

Ĉiuj anoj de la avilesa esperanta grupo ANTAŬEN gratulas emociigitaj la eminentan italan verkiston Umberto Eco. Li ricevis ĉijare la universalan Premion "Princo de Asturio" je beletro omaĝe al sia mirinda kaj laŭdita laboro.

La geesperantistoj de la t.m. neniam forgesos la defendon kiun li faris favore al la instruado de Esperanto. Laŭ lia opinio oni ĝin devus funkciigi en la lernejoj.

Ankaŭ nia grupo gratulas la avilesajn filatelistojn pro la laboro realigita favore al la inaŭguro de la "nacia ekspozicio de filatelo". Ili asertis ke la ĵusa emisio de poŝtmarko pri Avilés taŭgos por diskonigi la bildon de nia urbo ĉie. La poŝtmarko montras la famajn avilesajn akvotubojn de Sankta Francisko, kiu estas emblema monumento de la XVI jarcento. Ni sendos ilin al ĉiuj letergeamikoj kaj asocioj.

Ni, ĉiuj, daŭre laboros por la subtenado de nia grupo. La aktuala Prezidanto, nome Cezaro Garcia, estas juna samideano tre kapabla kaj inteligenta, kiu promesas konduki la direktadon de la grupo kun vera intereso kaj entuziasmo.



Korespondi deziras:


Olga Peña Díaz.- 54 jara

Kun geesperantistoj de la t.m. pri ĉiuj temoj.

Adreso:

C/ La Cámara 70 – 5º Izda

33400 - AVILÉS – Asturias - Hispanio



LA AĜO DE LA SENKULPECO

Kvazaŭ karesaĵo, frato, vi ricevas signalojn de tiuj kiuj kun vi senkulpas. Situantaj margene, sur la griza bordo kiu rigardas malestime la malpurajn akvojn, verŝigantaj en la kloakojn post la pluvo, aŭ tie en la altebenaĵo, sur la legxera nebulo kiu kvazaŭ maro inundas la malprecizan randon de malkvietiganta kavo, vi ricevas iliajn signalojn.

Viziaj sidemuloj aŭ aŭdacaj nomadoj akriĝas siajn eĝojn ĉiutage kontraŭ la malpuraĵo kaj la forgeso, kontraŭ la suburboj kaj la silento, vetante je sia vivo por defendi nur tion kion oni la Vivo maldonas al ili: la senkulpeco.

Ili rigardis ĉirkaŭe iun tagon; akraŭdaj kaj scioplenaj antaŭsentis la tragedion kaj elektis destine la preterlason de la homo. Ili estos ĉiam infanoj. Ili scias ke la stultecon de la homo nur sia malboneco superas. Ili rifuzas esti stultuloj. Kaj des pli esti malbonuloj. Ili elektis esti liberaj, eĉ liberaj de si mem, de tio kio atendis ilin post la aĝo: la aĝo de la senkulpeco. La aĝo de la senkulpeco ne estas la infaneco, la pubereco, la adoleskanteco, la juneco... La aĝo de la senkulpeco estas la momento kiam vi komprenas ke oni al vi ĝin forprenas, ke oni vin devigas esti plia homo.

Kaj vi luktas, sensanga lukto, senmalama lukto. Kiun oni trafu per glaveto? Kiun trapaŝu onia rigardo? Ne ekzistas glaveto kapabla ponardi la historion de la malnoblaĵo nek rigardo ampleksanta la senlimecon de la homa aflikto. Ne ekzistas la malamiko, en ĉi tiu milito.

La ununura espero estas aŭdi atente la sonon de la akvo fluante sur la stratojn dum la pluvaj tagoj kaj agordi la rigardon sur la leĝera nebulo tie sur la altebenaĵo. Kaj senti kiel vi ricevas, plenigita je origina kaj senmorta energio, la eĥon de aliaj voĉoj kaj la lumo de aliaj rigardoj kiuj animas vin avanci kaj neas la realecon de la vertiĝo kiel sola venko. Frato, vi ne estas sola.

DAMEGO

La Pratempo

LA RAN-VIRINO, QUORK-QUORK,

Niaj Geamikoj:

KAJ ŜIA FAMILIO

Aborigena mito el Norda Aŭstralio rakontas pri la verda rano, Quork-Quork (pr. Kŭok-Kŭok), kaj ŝiaj tri infanoj, Bumerali, la Fulmo-virino, Pakadringa, la Tondro-viro, kaj Tomituka, la Virino de la Musonaj Pluvoj.

Neniu aborigeno volas mortigi aŭ eĉ vundi verdan ranon, sciante ke, se li farus tion, Bumerali, la Fulmo-virino, detruus lin tuj, per sia fulmofrapo, dum la ŝtormoj, kaŭzitaj de Pakadringa kaj Tomituka inundus la ĉirkaŭaĵon kaj dronigus multe da personoj.

Dum la "malseka" sezono, virino, la Tondro-viro kaj la la Musonaj Pluvoj trans la ĉielon per la ilia patrino, Quork-



la Fulmo-Virino de vojaĝas nuboj, dum Quork,

saltetas de loko al loko sur la malsekega tero kuŝanta sube.

La Ran-virino, fiera pri la laboro de siaj infanoj, grakas pro ĝojo, kiam ŝi aŭdas la pluvon falanta torente, la Tondro-ŝtormojn furiozantaj kaj la fulmon rompanta la arbojn en multajn pecojn. Tamen, kiam la pluva sezono finiĝas kaj la nuboj malaperas el sur la ĉielo, la infanoj de Quork-Quork loĝas en Tuniruna, lando alta super la steloj kaj la Lakta Vojo, dum Quork-Quork ripozas trankvile en la malseketaj fendetoj de la rokoj aŭ en la kavaj arboj, ĝis ŝi aŭdos denove la sonon de falanta pluvo kaj la bruegadon de siaj infanoj sur la ĉielo.

Kunlaborantino:
JENNIFER R. BISHOP

Tradukita de **Peggy Ross**, (Brisbano)

ELDORADO

Post la alveno al Ameriko de la unuaj eŭropanoj kun Kristoforo Kolumbo en 1492, pluraj aventuremuloj kaj soldatoj el Hispanio komencis la konkeradon de la tuta kontinento altiritaj de la famo pri nenombreblaj riĉaĵoj, kredante en la mito pri "Eldorado".

Ĉi tiu fabela lando, kies grundo estus plenŝtopita je oro, vere fascinis tiujn homojn. Krome, la trezoroj ŝtelitaj en Meksiko de CORTÉS kaj de PIZARRO en Peruo ŝajne konfirmis la realan ekziston de tia regno.

Dum pli ol du jarcentoj multaj homoj ekis al ekspedicioj, kiuj finis nur en tragedio kaj sango. Tio, tamen, permesis al Hispanio la senpaŭzan koloniigon de la norda regiono de Sudameriko.

La mito pri Eldorado devenas de legendo pri la "ora homo". La historiisto kaj kronikisto Gonzalo FERNANDEZ de OVIEDO estas la unua, kiu mencias en 1534 la ekziston de tiu legendo. Tamen, jam multe antaŭ ol tio la hispanoj aŭdadis pri tiu regno lokiĝanta ie en la "nova kontinento".

La indiana tribo ĉibĉa el Cundinamarca (en ĉibĉa lingvo: "la kondora lando") en la nuntempa Kolombio, ĉiujare celebris interesan ceremonion: dum ĝi la tribestro sin ŝirmis per testuda graso kaj pulvorigita oro kaj poste promenis meze de siaj subuloj ĝoje kantantaj dum la tamburojn oni senpaŭze frapadis. La reĝo kaj la nobeluloj enboatigis kaj de tie ĵetis smeraldojn kaj oron kiel oferon al dioj. Finfine la tribestro plongis en la lago Guatavita kaj reaperis meze de tondraj aplaŭdoj.

De ĉi tiu fakto naskiĝis la legendo pri la "ora homo", poste baptita "Eldorado". Jaro post jaro la mito pli kaj pli ŝanĝiĝis kaj Eldorado transformiĝis en regiono plenega je oro, kie eĉ stratoj estis el oro kaj ĉiuj domoj estis kovritaj el arĝento kaj ĉiaspecaj juveloj.

La unua kiu ekserĉis Eldoradon estis tre kruela homo, la germano Ambroise ALFINGER. Li financis siajn vojaĝojn faritaj inter 1529 kaj 1538 vendante indianojn kiel sklavojn en Santo Domingo.

Forirante de Coro, la tiama ĉefurbo de Venezuelo, kaj suprenirante la riveron Magdalena li masakradis plurajn tribojn por eviti, ke ili poste ribelu. Li tamen, devis poste forlasi la ideon post pluraj jaroj da serĉado. Dum

batalo kun la indianoj meze de la ĵangalo li estis trafita de venenigita sago kaj iom post tio li mortis.

Ĉi tiu fakto entute ne malkonvinkis la alia avidulojn ja sekvis vojaĝoj de Jorge de SPIRA, Nicolás FEDERMANN, Sebastián de BELCAZAR ktp. Nur unu tamen, sukcesis ion; la hispano Gonzalo JIMÉNEZ de QUESADA, maljuna advokato, kiu estis poste baptita de sia biografisto Germán ARCINIEGAS per la kromnomo "la kavaliro de Eldorado".

Post longa kaj malfacila vojaĝo, dum kiu la vojaĝantoj estis atakitaj ofte de indianoj kaj mortis pro diversaj tropikaj malsanoj, li finfine eniris en januaro de 1537 en Cundinamarca kaj konkeris ties ĉefurbon Bogoto. Tie li efektive trovis oron kaj diamantojn sed nenion kio minimume similu al tiuj senfinaj orrezervejoj menciitaj de la legendo. Ci tia seniluziigo konvinkis la hispanojn ke Eldorado troviĝus aliloke. Pro tio ili vojaĝis tamen vane al oriento al la regiono, kie lokiĝas Gvajano kaj la rivero Orinoko, inter 1559 kaj 1569.

Malgraŭ la fiaskoj, la revoj pri Eldorado pluvivis ankoraŭ en la XVI^a jarcento. Tiel ekzemple, de 1584 ĝis 1597 Antonio de BERRIO vane serĉadis tiun mitan regnon. Li eĉ estis nomumita guberniestro de Eldorado, sed 15 jarojn post tio li mortis neniam trovinte la teritorion, kies regado estis lia tasko.

La mirindaj informoj de la angla esploristo, Walter RALEIGH kontribuis al diskonigo de la legendo inter la XVII^a kaj la XVIII^a jarcentoj kaj eĉ Voltero situis tie unu el la aventuroj de Kandido.

La mito definitive komence de la XIX^a jarcento estingiĝis. Pro peto de hispanoj, kiu ankoraŭ kredis je tiu mito, la germana sciencisto HUMBOLDT esploris la valoj de Apure kaj Orinoko. Liaj topografiaj notoj ne permesas alian konkludon: Eldorado estute ne ekzistas.

En 1954 kelkaj kolombiaj arĥeologoj informis, ke iu meteoro falis antaŭ milo da jaroj en la lago Guatavita. La ceremonio de la "ora homo" estas, do, nenio alia ol rememorigo pri tiu fakto kaj samtempe tia ritualo estas ofero al dio, kiu kune kun la meteoro eniris la lagon. Tiel evidentiĝas, ke multaj aviduloj pri riĉaĵoj vane kaj suferante nur persekutadis ĉielan ŝtonon, kies lumo eĉ antaŭ multaj jaroj jam estingiĝis.

Atilio ORELLANA ROJAS

PRI



KATOJ KAJ KUNIKLO

Mi estas 54 jaraĝa flegistino, laboranta en hospitalo en operaciejo. Mia familio: edzo, filino kaj katoj Rusaŭka, Jula kaj Zuzia. Ĉiuj katoj estas bestoj trovitaj, vagantaj kaj febre serĉantaj estas ne rasaj katinoj. La unua

domon, hejmon. Do ili Jula venis al mi antaŭ kvin jaroj la lasta Zuzia ĉiaŭtune. Kion mi povus fari?. Mi akceptis ilin.



Rusaŭka, starigas la regulojn. Ekzemple ŝi tre gardas sian lokon por dormi, apud mia kuseno. Se iu invadas ĝin, ricevas baton de Rusaŭka, kelkfoje la aliaj katoj ankaŭ rajtas kuŝi en la lito, tamen nur malproksime de la kuseno. Se Zuzia kaj Jula tro vigle ludas Rusaŭka povas enkonduki ordon nur per severa rigardo. Mi klopodas ne tro interveni ilian vivon, kaj po egale dividi karesojn.

Ĉisomere feris en mia hejmo nekutima gasto, kuniklo de mia filino. Mi timis kiel reagos la katinoj, sed imagu, estis neniu problemo. La katinoj akceptis ĝin singarde, sed amike kaj la kuniklo tute ne montris timon. Kun granda intereso ili flaris reciproke siajn nazojn, la katinoj kun granda intereso vizitadis ĝian grandan kaĝon kaj povis manĝi ĝian manĝaĵon. Rusaŭka tre volonte dormadis en la kaĝo. Se mi estis hejme mi malfermadis la kaĝon por ke la kuniklo libere vagadu tra loĝejo. Ĝi eĉ kuraĝis viziti balkonon kaj tio tre plaĉis al ĝi. Post kelka tempo la kuniklo faraĝis mastro inter la bestaro, sukcese scipovis defendi sian teritorion, forpeli la katinojn el sia kaĝo. Kompreneble, se mi foriradis el hejmo, mi tamen metis la kuniklon en la kaĝo kaj kaĝon mi fermadis. Mi ne kredis al Zuzia, kiu provis ludi kun ĝi katmaniere, do mi timis por ke ŝi ĉasu ĝin.

La kuniklo estis tre karesema besteto, ĝi tre ŝatis por glatumi ĝian felon, por reciproki kareson, ĝi lekis mian nazon aŭ frunton kaj tre ŝatis grati mian kapon taŭzante miajn harojn. Ĉu tio ŝajnis al ĝi herbejon?.

Nun restis nur miaj katinoj, mia filino forportis sian kuniklon, sed ĝi probable sopiris al katinoj, estis malgaja, do la filino aĉetis al li por akompano kobajon. En libro pri kunikloj oni skribis, ke tiuj du bestetoj tre facile amikiĝas.

Post tiu venis al mi nova katido. Tiu katido tamen kontraŭe al la kuniklo ne estis akceptita de la aliaj katoj kaj pro tiu mi devis ĝin transdoni al amikoj.

Folioj de Kat-Amikaro. Linderbergsg. 4
Redaktorino S-853 56 Sundsvall
Ingrid Näsholm Svedujo

Dorota Burchard (Pollando)

EN CIRKO

- Kiel povas esti, ke tiel malforta kaj maldika viro estas tre bona dresisto de tigroj?
- Ĉar kiam la tigro rigardas al li, ĝia apetito malaperas.

Patricia Harkin
Australio



- Nu, kiujn artifikojn vi instruis hodiaŭ
- Al nia hundo

Iván Varjuhin
Rusio

Novgeedzoj ĝuas edziĝan vojaĝon kaj la unuan matenon la edzino tenere demandas sian edzon:

- Kiel dormis, mia kara?
- Kun fermitaj okuloj, mi kredas, respondis la novbakita edzo

Sylvia Hamalainen
Finnlando.

EN GASTMANGEJO

- Kelnero, alportu al mi kotleton.
- Kun plezuro.
- Povas esti sen plezuro, sed nepre kun pli da terpomo

Valentin Georgiev
Bulgario

PETAJO

Mi petas humoraĵojn el diversaj landoj por Publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CÍSIMO R. SIMON
c/ La magdalena nº 26 - 1º D
C.P.33400 - AVILES

AMATA LAND' ASTURIO

(Asturias, patria querida)

Moderato

CANCIÓN

A-ma-ta land' As-tu-ri-o: Vin a-mas mi tre kor-
var-me! Mi c̃i-am es-ti de-z̃i-ras en
vi. Vi l̃o-gas min c̃ar-me. Mi su-pren-
sibs
grim-pas al ar-bo, flo-r̃on mi 3̃i-ros de g̃i, por la bal-
sibs
ko-non or-na-mi de la dol-ça fi-an-çin! Se la dol-
sibs
'ça fi-an-çin' ne vo lus g̃in por or-nam' mi, spi-te
sibs
flo-r̃on del ar-bo 3̃i-ri de-ci-di-g̃is jam.